

El memor-albumoj de familio Koopmans pri la 1:a Komuna Kongreso en Limburg an der Lahn, en 1968. (Vidu la paĝojn 84–86)



Benata helpas  
LKK-aninojn



Jelly Koopmans-Schotanus kaj Sinjorino  
Drost dum matenmanĝo en la pensiono  
(‘Konditorei’) kie pluraj kongresanoj tranoktis



Anna Alamo-Sandgren  
(KELI) kaj Jacques Tuinder  
(tiam prezidanto de IKUE)

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

**Sekretario:** Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,  
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio  
☎ +420 723 672 335;  
✉ polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto:** Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,  
HU 1072 Budapest, Hungario  
☎ +36 302 000 306;  
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':  
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;  
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;  
☎ +46 70 2004574; ✉ dr\_board@yahoo.se

**Kontrollegis:** Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio  
✉ info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## ENHAVO

Mi estas la Alfa kaj Omega	75
Jesuo estas mia roko	79
Biblio de Kralice	80
Letero de Hieronimo	83
Hieronimo – vivo de Malĥo	85
El la memor-albumoj de familio Koopmans pri la 1:a komuna kongreso 1968 en Limburg/Lahn	88
August Weide	91
Vivi en paco	92
Informetoj	93

## Redaktoraj vortoj

**K**araj legantoj, mi multe bedaŭras la malfruon de la nuna numero de Dia Regno. Ĉiu kaŭzo estis ĉe mi. Iom tiu malfruo certe influos la sekvan numeron, la kvinan, sed estu certaj ke antaŭ Kristnasko venos la sesa numero.

Kiel vi jam vidis sur la fronta paĝo, ĉi-foje ni daŭre iom memorigas nin pri la 1:a komuna kongreso de KELI kaj IKUE, en Limburg an der Lahn, kiu okazis antaŭ 50 jaroj. En tiu partoprenis la familio Koopmans kaj en la mezo de la gazeto vi vidas bildojn kaj paĝojn de albumoj pri ilia ĉeesto. Mi multe dankas pro la ebleco publikigi tiun materialon.

En la sekva numero ni raportos pri la ĉi-jara kongreso. Jam nun vi povas legi predikon kaj prelegon faritajn dum la ĉi-jara kongreso.

Mi supozas ke pluraj legantoj havis la eblecon legi la aŭgustan leteron de Julia Sigmond, sed mi tamen republikigas parton de ĝi, kiu temis pri okazaĵo en trajno en Italio kiu montras la kreskantan malamon kontraŭ aliuloj. Kial ne eblas vivi en paco? ☞

# Mi estas la Alfa kaj la Omega

## Prediko dum la Ekumena Esperanto Kongreso 2018

Pavel KLIMEŠ, ĈZ

Kaj Li diris al mi: Ĉio fariĝis. Mi estas la Alfa kaj la Omega, la komenco kaj la fino. Mi donos donace al la soifanto el la fonto de la akvo de vivo.

Apo 21,6

**K**araj gefratoj, la lasta libro de la Nova Testamento estas ekstra libro, kiun ni malfermas kun streĉo. Kion novan ni trovos en ĝi? Ĉiam ni surpriziĝas. Kaj ĝi nin ĉiam alparolas.

Tuj en la komenco en la unua ĉapitro en la 8-a versiklo ni legas: „*Mi estas la Alfa kaj la Omega, diris la Sinjoro, la Dio, kiu estas kaj estis kaj venos, la*

*Plejpotenca*.“ Dio diras al ni ne nur, ke li estas la Plejpotenca, sed ke li kondukas la mondon de la komenco ĝis la fino. Unua greka litero la Alfa kaj la lasta Omega tion konfirmas. Lia agado estas daŭra kaj eterna, neniam finiĝas kaj neniam ripozas. Dia ĉeesto estas ĉiama.

Kaj simile en hodiaŭa teksto, kiu troviĝas en la fino de la libro de Apokalipso, kiam ni jam estis atestantoj de multaj bildoj de apokalipso, fino de ĉio, donas Dio esperon: mi estas ĉi tie kaj mi restos ĉi tie. Neniam estos via vivo sen mi, ĉar mi staras apud vi. Mi estas tie ĉi kaj daŭrigos. Mi estas kiel roko, kiu neniam ŝanĝas sin.

La hodiaŭa teksto havas fakte du apartajn partojn: la unua parolas pri la certeco de Dia ĉeesto. „*Mi estas la Alfa kaj la Omega, la komenco kaj la fino*.“ Tio estas certeco, mi povas diri ia *statika certeco* de nia estado, la fundamento de nia ekzistado. La lasta litero Omega tie ĉi faras samtempe la Alfo-n, la novan esperon, novan komencon.

Ni ne devas forgesi la unuajn vortojn, kiujn ni en nia teksto legas: „io fariĝis“.



Kiam ni legus ilin sole, eble ni ne scius, *kio fariĝis*. Sed en la Dia sentempo, kie ne estas pasinteco, nuneco nek estonteco de io, sed io estis iam samtempeco, *io jam fariĝis*. Jam venis la promesita savo, kiun la Sinjoro donas al homo kaj al ĉiu kreitaĵo kiel donacon jam en la komenco de ĉio. Ĉar li mem estas la komenco de ĉio.

Ni povas demandi, kie staras ni, homoj, kiuj ankoraŭ diferencigas, kio jam okazis, kiajn erarojn ni faris, kaj kie ni kontraŭe faris ion, kio estas laŭ nia opinio bona. Ni diferencigas, kion ni jam travivis, kion ni nun travivas kaj kio nin ankoraŭ atendas. En la kurado de la tempo, ni povas tuj senti nin solaj kaj embarase ĉirkaŭrigardas, kiel daŭrigi.

Sed Dio donas al ni respondon: Mi estas kun vi, tiam, nun kaj ĉiam. Senĉese vi estas mia. „Mi estas la Alfa kaj la Omega, la komenco kaj la fino.“

Kaj poste tie estas la dua parto de la teksto, kiu estas kontraŭe tre *malstatika*: „*Mi donos donace al la soifanto el la fonto de la akvo de vivo.*“ Tie ĉi Dio parolas persone al ĉiu el ni. Li, la Plejpotenca kaj Eterna, mem disdonas la akvon. Tio estas simila, kiel nur kelkajn frazojn antaŭe li promesas, ke li mem „*forviŝos ĉiun larmon*“ el niaj okuloj. La Eterna kaj Senfina, super ĉio staranta, alvenos al ĉiu el ni ĝustatempe por ke li helpu nin, donu la manon, por ke li ne lasu nin soifĵi, por ke li konsolu nin.

Dio sendis sian filon, Jesuon Kriston, por ke li travivu homajn ĝojojn kaj dolorojn.

Tiu ĉi Jesuo Kristo alvenas al la puto,

kie unu samaria virino ĉerpas akvon. Li iras al ŝi kaj proponas al tiu ĉi virino akvon el sia fonto.

Ni ĉiuj konas tiun historieton. Post mallonga konversacio, kiam la virino ne komprenas, diras Jesuo al ŝi: „*Ĉiu, kiu trinkos el la akvo, kiun mi donos al li, tiu neniam soifos; sed la akvo, kiun mi donos al li, fariĝos en li fonto de akvo, ŝprucanta supren por eterna vivo*“ (Joh 4,14). Kian akvon proponas al tiu virino la Sinjoro Jesuo? Li proponas la akvon de eterna vivo, li proponas al ŝi la eternan vivon.

Por ĉiuj homoj en Proksima Oriento akvo estis la fundamenta neceso por travivado. Ankaŭ ni scias, kion signifas ne havi sufiĉe da akvo. La simpla samarianino scias, kion signifas la manko de la akvo. Ŝi jam komprenas, ke la fremdulo proponas alian akvon, akvon de eterneco. Ŝi kunvokis la tutan urbon kaj „*multaj Samarianoj el tiu urbo ekkredis al li*“ (Joh 4,39). Ne pro interparolo kun tiu virino, sed pro tio, ke ili mem ekaŭdis la Vorton de Jesuo. „*Jam ne pro via diro, ni kredas, ĉar ni mem aŭdis lin; kaj ni scias, ke ĉi tiu estas vere la Savanto de la mondo.*“ (Joh 4,42)

La Sinjoro Jesuo donas sian akvon al soifantoj en sia Vorto kaj en sia ĉeesto. Jesuo mem estas la eterna ĉeesto Dia, sed estis viktimo pro niaj pekoj sur Golgota.

Sed nek post lia ekzekuto ni ne restas solaj. En la evangelio de Johano ni legas ankoraŭ unu alian proponon de akvo al soifantoj: „*En la lasta tago, la granda tago de la festo, Jesuo staris kaj kriis, dirante: Se iu soifas, tiu venu kaj trinku.*“

*Kiu kredas al mi, kiel la Skribo diris, el ties ventro fluos riveroj de viva akvo.*“ (Joh 7,37-38)

Jesuo vokas sekvantojn al si. Li proponas al ili akvon. Li proponas akvon al ĉiuj, kiuj soifas, al ĉiuj, kiuj estas sekiĝintaj, al ĉiuj, kiuj serĉas kaj ĝis nun ne trovis.

Sinjoro Jesuo sekvantojn ne premas. Li ne devigas ilin al io, li nur proponas. Li donas ion al ilia dispono.

Li donas al ilia dispono sin mem. „*Venu al mi kaj trinku!*“ Akceptu tion, kion mi bonanoncas. „Kiu kredas al mi, kiel la Skribo diris, el ties ventro fluos riveroj de viva akvo,“ li daŭrigas. Tiu, kiu trinkas tiun akvon, kiun mi proponas, kiu sopiras pri ĝi, kiu volas ektrinki el freŝa fonto, venu al mi kaj trinku. Tiu, kiu fariĝos mia disĉiplo, kiu ekkredos al mi, tiu travivos, ke el lia ventro fluegos la viva akvo. Li neniam havos mankon, li neniam soifos, sed kontraŭe eblos trinkigi aliajn soifantajn.

Por pilgrimantoj tio estas tute nova propono. Tio tie ĉi ankoraŭ ne estis, pensas tiuj, kiuj aŭdas Jesuon ---

Sed vere ĉu tio ankoraŭ ne estis? Ĉu vere diras tiu ĉi, per stranga lumo brilanta homo, ion tute novan?

Li mem pri sia doktrino, kian li sciigas, diras nur iom pli frue: „*Mia instruado estas ne mia, sed Ties, kiu min sendis. Se iu volas plenumi Lian volon, tiu scios pri la instruado, ĉu ĝi estas de Dio, aŭ ĉu mi parolas nur el mi mem.*“ (Joh 7,16-17)

Jesuo proponas la novan fonton de akvo, kiu estingas la soifon pri pleneco de la vivo. Li proponas ĝin al tiuj, kiuj estas sekigitaj kaj kiuj serĉas.

Li proponas al soifantoj daŭran plenecon kaj novan vivon. Li proponas plenecon kaj novan vivon.

Jam la profeto Jeĥezkel en la 47-a ĉapitro parolas pri la mirakla akvo, kiu elfluas el la Dia templo, kiam li profetas pri la nova Jerusalemo. Tiu akvo, kiu elfluas el templo, resanigos kaj eĉ tio estos la akvo viva!

Jesuo ankaŭ parolas pri akvo. Lia akvo kvietigos la soifon kaj ĝi trinkigos ĉiun, kiu ĝin gustumos. Do venu al la fonto de la viva akvo, al Kristo Jesuo! Tio estas la vera akvo, kiu fontas ĉe la vera altaro.

Li estas la Filo de Dio kaj la Filo de homo, li estas la templo de Dio, el kiu la reviviga akvo elfluas. Ĉiu, kiu soifas, trovas ĉe li mildigon.

„Kiu kredas al mi, el ties ventro fluos riveroj de viva akvo.“

La Sinjoro Jesuo en la plej bona tempo montras al tiuj, kiuj vidi volas,



kie tiu ĉi akvo fontas. La Dio, kies Vorto estas la viva akvo, estas tia fonto.

Karaj gefratoj, Dio donas tie la pluan promeson: el tiu, kiu ekkredos al Jesuo Kristo kiel Filo de Dio, el li fluos riveroj da viva akvo de lia graco, al ĉiuj aliaj, kiuj serĉos savon.

La evangelisto Johano klarigas: „*Tion li diris pri la Spirito, kiun devus ricevi tiuj, kiuj kredis al li; ĉar la Spirito ĝis nun ne estis donita, ĉar la Jesuo ankoraŭ ne estis glorita.*“

Jesuo tiam preparadis siajn proksimumojn al la nova situacio, kiam ili ricevos la Sanktan Spiriton, kiu estos elverŝita al soifantaj disĉiploj, post tio, kiam li mem estos glorata.

En nia hodiaŭa teksto ni trovas kaj firman certecon en la Patro, kiel Kreinton de ĉio, kaj potencon de Jesuo Kristo, kiel lia Filo, kiu alportas la akvon de la vivo al homoj, nek la personon de la Sankta Spirito, kiu malstatike, iam kiel forta vento, iam kiel

subtila bloveto, portas tra ĉia ekzistado la vivan sciigon pri la viva Sinjoro.

Dio donas donacojn al homoj: li donis sian Filon kaj li donas al ili ankaŭ sian Spiriton, li donas al ili la certecon de eterna vivo. Tio ĉio estas donaco de nia Sinjoro kaj ĉiu donaco estas senpaga.

Donacon ricevas nur tiu, kiu meritas ĝin, kiu aŭdas, perceptas kaj dankeme akceptas al sia koro sciigon de la Dia Vorto. Ĝi poste kiel la fonto de la viva akvo elfluas kaj pridonacas aliajn kreaĵojn.

Nia teksto estas miriga kunligilo inter pasinta tempo, nuntempo kaj estonteco de la Dia popolo.

La akvo de pura kaj vera Vorto, Dia saĝeco kaj partopreno de la Sankta Spirito komenciĝas en fluoj de viva akvo en profeto Jeĥezkel, daŭras tra nuntempo, kiam Sinjoro Jesuo Kristo al si vokas tiujn, kiuj soifas pri Dio, kaj gvidas en estontecon, kiam estos promesata la Spirito de Sinjoro, kiu per

*Ho Eternulo, Dio Cebaot! Revenigu nin, lumigu vian vizaĝon, por ke ni estu savitaj!*

Kaj ni ne foriros de Vi; vivigu nin, kaj ni vekos Vian nomon. Via brako estu super la viro de Via dekstra mano, super homido, kiun Vi fortikigis por Vi.

Psa 80, 19.18.17

**H**o Eternulo, ni laŭdas vin pro via amo. Via pacienco estas senlima kaj via favorkoreco estas eterna. Ni dankas, ho Sinjoro, ke vi akceptas nin, sed vi volas, ke ni komprenu viajn eternajn intencojn kun ni. Vi scias pri niaj malfortecoj kaj pri niaj senkonstantecoj, pri niaj kulpoj. Sed vi ankaŭ scias pri nia sopiro je vi kaj pri komuneco kun vi.

Vi alvenas al ni tra via Filo kaj tra la Vorto de evangelio. Donu, ke ni akceptu ĝin en espero kaj malfermeco. Tio estas la Vorto de la vivo por tiu, kiu kredas. Ni dankas al vi pro donaco de nia kredo kaj ni petas, ne prenu ĝin de ni.

Ho Dio nia, ni volus starigi antaŭ vi iam preparataj, sed ni konfesas, ke tia ĉi mondo kaj nia avideco estas ofte ĉe ni. Ni petas vin, vi mem purigu nin por via Vorto kaj espero. Ni petas pri via paco.

Amen

fluoj de viva akvo inundos la tutan mondon. Estu tio jam en nia tempo!

Karaj gefratoj, ni renkontiĝas tie ĉi en Poděbrady en kongreso de kristanaj esperantistoj, kiel homoj de diversaj nacioj kaj kulturoj, sed kiel gefratoj, kiuj havas unu Sinjoron, tiun, kiu estis kaj estas kaj denove venos.

Li donas al ni grandegan riĉecon en sia Vorto. Fluu el ni tiu ĉi Vorto de espero, amikeco kaj gefrata amo al la tuta mondo. Ni ne estu kontentaj nur kun la ekstera formo, sed ni eniru en profundon, serĉu kaj sopiru. La vivan akvon de la Dia trono ricevos senpage nur tiu, kiu vere soifas.

Ĉu ni povas ion proponi?

Ni proponas Kriston, „tiun krucumitan“ (1Kor 2,2). Ni proponas

Kriston, kiu ŝajnas al multaj homoj jam maljuna kaj eĉ neinteresa.

Pro tio ili serĉas diversajn travivaĵojn, diversajn ĵonglaĵojn, diversajn misterojn.

Sed ni scias, ke tion ni ne bezonas. La Sinjoro Jesuo estas ĉiam nova kaj inspiriga. Nur ni devas lasi lin vere elparoli.

Ni petu por la donaco de la Sankta Spirito, lasu nin trafenetri per ĝi, por ke ĝi nin trinkigu kaj estingu nian soifon, por ke ĝi estu por ni la viva gvidanto, donacanto de espero kaj viviga elano, por ke ĝi ankaŭ por ni estu la viva akvo, kiu devas inundi la tutan mondon.

Amen



## JESUO ESTAS MIA ROKO


Ne vin apogu sur la muro ĉar ĝi disfalos.  
Ne apogu vin sur la mono ĉar ĝi malaperos.  
Ne apogu vin al la tempo ĉar ĝi ne apartenas al vi.  
Ne apogu vin al la estonteco ĉar ĝi estas malcerta.  
Ne apogu vin eĉ vi mem ĉar vin vi ne konas.

Prefere, apogu forte, subtenu forte al Jesuo ĉar li estas la ŝlosilo kondukanta al la sukceso. Tio estas, faru la laboron kiel kutime kaj Dio benos vian laboron kaj ĝi frukton donos.

Via sincera amiko

*Honore Sebuho* (honsebn@gmail.com)

**E**n la 16-a jarcento kaj komenco de la 17-a jarcento Bohemio kaj Moravio longtempe ne suferis de milito. Danke al la regento kaj poste la reĝo Georgo el Poděbrady kaj Kunštát (1420-1471), kiu estis modera utrakvisto, la sekvoj de husanaj militoj (1420-1434) estis eliminataj kaj ambaŭ landoj ekonomie prosperis precipe dum longtempaj regadoj de Ladislao la 2-a Jagela, Ferdinando la 1-a Habsburga kaj Maksmiliano la 2-a Habsburga.



Titola paĝo de la unua volumo de la Biblio de Kralice el la jaro 1579 (Kvin libroj de Moseo).

Sed pli signifa ol bona ekonomia situacio estis religia toleremo. Danke al bona religia toleremo de la reĝo Georgo el Poděbrady, en nia lando povis kunekzisti malnovaj utrakristoj, novaj utrakristoj, katolikoj, evangelikoj, Moravia Kunfrataro, luteranoj, kalvinanoj kaj kelkaj aliaj eklezioj kaj sektoj (ekz. nikolajanoj, anabaptistoj, habrovanoj). Rilatoj inter la eklezioj ne estis idiliaj, sed ĉiuj povis ekzisti kaj evolui.

En tempo de renesanco niaj landoj renovigis siajn kontaktojn kun aliaj landoj kaj la kulturo povis evolui. En mezepoko neniam antaŭe, kaj neniam poste, ĉeĥa lingvo sonis tiel bele estante riĉa kaj ornamita kiel en la 16-a jarcento.

En Bohemio kaŝitaj presejoj de Moravia Kunfrataro ekzistis en Litomyšl (1503) kaj Mladá Boleslav (1518).

En sudmoravia urbo Ivančice (proksimume 30 km sudokcidente de Brno) Altlernejo de Moravia Kunfrataro, kies la plej fama rektoro estis germana pedagogo, filologo, fizikisto kaj historiisto Esrom Rüdinger (1523-1591) sukcese funkciis. La altlernejo havis tiel bonan nivelon, ke tie kune kun junaj nekatolikoj studis ankaŭ filoj el katolikaj nobelaj familioj. Fama elstarulo de Moravia Kunfrataro estis la episkopo Jan Blahoslav (1523-1571).

Krom oficiala altlernejo en Ivančice 16 jarojn ekzistis kaŝita presejo de



Moravia Kunfrataro. Kelkaj sciencistoj opinias, ke la presejo estis en la urbon translokigita el Szamotuły, kie jam en la jaro 1561 estis eldonita en ĉeĥa lingvo belega kantaro de Jan Blahoslav „Kantoj por laŭdoj de la Dio“ [Písňe chval božských], tiel nomata Kantaro de Szamotuły [Šamotulský kancionál]. Inter fratoj estis edukitaj homoj, kiuj sciis ne nur grekan kaj latinan lingvojn, sed eĉ hebrean kaj aramean lingvojn. Ili kapablis traduki bibliajn tekstojn uzante ne nur latinan Vulgaton kaj grekan Septuaginton, klasikajn tradukojn de la Sankta Biblio, sed ankaŭ originajn hebreajn kaj arameajn tekstojn. Tial en kaŝita moravia presejo El Ĝardeno Insulo (Ex insula hortensis) estis kreitaj kvalitaj kaj valoraj tradukoj de bibliaj tekstoj. Jan Blahoslav ĉeĥigis Novan Testamenton. Lia traduko estis presita en kaŝita presejo en Ivančice en la jaro 1564. Post morto de Blahoslav liaj kunlaborantoj ĉeĥigis la Malnovan Testamenton (1577).

La 30-an de junio 1577 Rudolfo la 2-a Habsburga eldonis sian mandaton „kontraŭ religiaj novaĵoj en Moravio“. Tial moraviaj fratoj en printempo



Ruinoj de la fortikaĵo en Kralice super Oslava.

de la jaro 1578 la presejon kaŝe translokigis en pli sekuran lokon – en la vilaĝon Kralice nad Oslavou. Ekde la jaro 1349 jam estas menciita fortikaĵo de Kralice. La nobelo Henriko Kralický el Kralice (†1576) konstruigis ĉe la gotika fortikaĵo renesancan palaceton, kiun li poste vendis al sia nevo Johano la Pli Aĝa el Žerotín (†1583). Tial en la fortikaĵon de Kralice en printempo de la jaro 1578 povis esti kaŝe translokigita la presejo de Moravia Kunfrataro el Ivančice. La presejo estis kaŝita malantaŭ librobindejo. En la fortikaĵo troviĝis ankaŭ scienca biblioteko kun vortaroj de diversaj lingvoj. Dum 42 jaroj (1578-1620) el la presejo estis eldonitaj 76 titoloj de libroj.

Metiistoj de la presejo suferadis de ĥronika venenigo de pezaj metaloj (stano, plumbo, stibio) el kies alojo estis elfanditaj metalaj literoj. Tial ili ne vivis longtempe.

La Biblio de Kralice estis presita en presejo de Moravia Kunfrataro en Kralice nad Oslavou en la jaroj 1579-1593. La sesa volumo de tiu sesvoluma Biblio estis traduko de Nova Testamento. Ĝi estis preta jam en la jaro 1593, sed eldonita nur en la jaro 1594. Por uzado en ordinara praktiko estis eldonitaj unuvolumaj Bibliojoj en la jaroj 1596 kaj 1613.

Decembre en la jaro 1620 rezidejo de la presejo en fortikaĵo de Kralice nad Oslavou estis atakita de rajda taĉmento de marŝalo Buĝoy [bukvoj], unu el la militestroj de Katolika Ligo. La soldatoj (inter kiuj estis multe da analfabetoj), anstataŭ mono kaj oro trovis nur metalajn literojn. Ili koleriĝis kaj

plimulton da literoj elĵetis el fenestroj de la dua etaĝo en fosaĵon, kie jam estis multe da neĝo. Tial multe da literoj restis en tero, sed dum la jarcentoj ne rustiĝis, ĉar la stano, plumbo kaj stibio neniam rustiĝas.

Post atako de soldatoj la kunfrataranoj translokiĝis riparitan presilon en kastelon de Karolo la Pli Aĝa el Žerotín (1564-1636) en Náměšť nad Oslavou.

Post eldono de la dokumento Restituta Landordo (kiu ekvalidis en la jaro 1627 en Bohemio kaj en la jaro 1628 en Moravio kaj Silezio) ne-katolikoj devis foriri. Episkopo Jiří Erastus kaŝe alportis la presilon en Vroclavon, kie trovis sian azilon Karolo la Pli Aĝa el Žerotín, kaj post unu jaro ĝin ricevis azilanto Jan Ámos Komenský (1592-1970), kiu rezidis en pola urbo Leszno [leŝno]. Komenský uzadis la presilon en Leszno ĝis la jaro 1656, kiam ĝi estis neniigita per fajro dum revolto de polaj katolikoj.

En ekzilo Biblio de Kralice estis eldonita en Halle an der Saale (1722, 1745, 1766) kaj Bratislava (1787, 1808). En la jaro 1863 ĝi estis eldonita en Bohemio (Prago).

En fino de la 19-a jarcento ĉeĥa pastoro, verkisto kaj bibliisto Jan Karafiát (1846-1929) preparis korektitajn eldonojn de la Biblio de Kralice kaj ankaŭ en la jaro 1915 li preparis unu eldonon.

Ekde la 16-a ĝis la 19-a jarcento la ĉeĥa lingvo de la Biblio de Kralice estis uzata en Slovakio kiel liturgia lingvo de slovakaj evangelikoj. Tiel La Biblio de Kralice helpis al slovakoj, kiuj kreis sian literaturan slovakon lingvon.

Kaj kia estis sorto de la literoj en tero? Kiam moravia historiistino Vlasta Fialová (1896-1972) arĥeologe esploris Fortikaĵon de Kralice, ŝi kaj ŝiaj kunlaborantoj, precipe lernantoj de loka baza lernejo, en tero trovis pli ol 4000 metalajn literojn. Tio estis eŭropa unikaĵo! Multe da ekzempleroj de diversaj Biblioj ekzistas en muzeoj, sed metalaj literoj, kiuj estis uzataj por presado de la Biblio, estas raraj. Tial en la jaroj 1967-1969 laŭ projekto de profesoro Bohuslav Fuchs en Kralice nad Oslavou estis konstruita Muzeo de Biblio de Kralice, kiu atendas vian viziton.

Vizitu ankaŭ la 3-lingvan retpaĝaron:  
[www.mzm.cz/pamatnik-bible-kralicke](http://www.mzm.cz/pamatnik-bible-kralicke)

☞



Monumento de la Biblio.

## El la aŭgusta letero de Julia SIGMOND

**T**ristigan kaj timigan novaĵon legis en la gazeto Filippo. Sur la trajno Milano-Cremona ekparolis en mikrofono virina voĉo: “Ciganoj kaj molestantoj descendu tuj de la trajno.” Multaj timigitaj vojaĝantoj forlasis la trajnon. Sola, kuraĝa junulo, Raffaele Ariano protestis ĉe la urbestro. Poste li estis konstante minacata. Lia patrino skribis leteron kaj petis helpon de la ŝtatestro, ĉar ŝi timis, ke oni mortigos sian filon.

Multaj diversaj similaj aferoj okazas nuntempe en Italio. Kial ne povas vivi en paco la homoj?

Kial oni ne povas ami unu la alian, se iu estas “alia” ? Ja ni ĉiuj estas terloĝantoj

Mi scias, ke ekzistas multaj homoj, kiuj amas kaj helpas tiujn, kiuj bezonas ies helpon.,

Bedaŭrinde nur la malmulto de la homaro estas helpema!

Ho ve! Kiel tristiga estas la situacio de la homaro en la dudekunua jarcento!

ESPERO

Tamen, ni neniam perdu la esperon!!!!!!

-----  
Noto de la redaktoro

La supra okazaĵo estas ankaŭ raportita angla-lingve en:

*The Local*: <https://www.thelocal.it/20180808/inquiry-launched-after-train-announcement-tells-gypsies-to-get-off>

*Gates of Vienna*: <https://gatesofvienna.net/2018/08/an-insult-to-gypsies-on-the-train-from-milan-to-mantua/>

---

**S***injoro, mi komprenis*, ke por ami Vin, kaj por ami miajn fratojn, mi devas esti interne malriĉa. Sinjoro, por ke, mi ĉiam pensu pri la aliaj, instruu min kontentiĝi per malmulto, uzi nur tion, kio necesas, ne esti postulema, ne zorgi pri mi mem pli ol necese. Mi lernu tion, por sekvi Vin, por kompreni ke Vi estas la ununura riĉaĵo, ke ĉio estas perdita, kiam Vi mem ne estas la vera riĉaĵo de mia koro (G. Volpi)

El Espero Katolika 4/1987

# El memor-albumoj de familio Koopmans el Leiden, Nederlando pri la 1:a Komuna Kongreso de KELI kaj IKUE en Limburg an der Lahn, Germanio, 25/7-1/8/1968.

Benata KOOPMANS skanis familiajn fotojn kaj taglibron rilate la familia partopreno en la unua komuna kongreso, kiu okazis antaŭ 50 jaroj.



Kongreskarto de Jelly Koopmans-Schotanus, kongresnumero 122

Jaŭdo, 25-7-'68

**Unua Kongrestago**

Post bona dormo en la Junnargastejo kaj matenmanĝo, ni kune kun Lili Madai kaj Jugoslava Sinjorino, iris en la direkto de la Kongresejo. Unue ni iris al la pensiono de panjo, kie ni bonege dormis.

Ĉe la Kongresejo jam multaj kongresanoj alvenis. Antaŭ la halo ekis ekspozicie ornamita, i.a. kun sloganoj kaj gazeteltransaĵoj. En la granda salono ni jam agrable interbabilis.


Poste ni konduktois diversajn kun iliaj kafroj al siaj hoteloj.

Tagmeze ni kunvenis por promonado tra la urbo, kie funkcio de la VVV gvidis nin tra multaj interesaj stratoj kun fakdomoj kaj historiaj sciindaĵoj. Nun ni por la unua fojo vidis antaŭ la belegan katedralon, romanstilan el la 13a jarcento, kiu tiel impone estas konstruita kontraŭ la Stonega delivro de la rivero Lahn.

Veopere ni tre bongrade manĝis en restoracio.

Poste ni iris al la Kongresejo, kie okazis la Internona Vespero.

Antaŭ Sigiŝinde Stamm, Sro Hayenthal kaj 2 aliaj sinjoroj nun veiris al la Junnargastejo. Tie ni bone dormis, ĝen la fino de la unua Kongrestago.





temo: Reformacio. lundo, 29-7-'68

### Kvina kongrestago

Post la matenpraĝo, kiun Heinz Mielke gvidis, okazis tre longa prelego de Prof. W.J. Downes pri: **"La Fundamentaj reformaciaj ideoj"**. Poste estis padica diskutado kune kun Stefan Maul, Tadeusz Duranti, Sro W. Krikke kaj Past. Downes.


Prof. Downes prelegis precipe pri la ucelpunkto de la protestantoj, je la katolikaj ideoj kaj dogmoj. Sed dum la diskuto surdeklariĝis ke ankau KELIanoj ne samopinias kun la ofte generalizitaj pensoj de Prof. Downes.

Petencoj: R.K. havas nun finan absolutan <sup>eksternan</sup> aŭtoritatan mercaĵoj, liturgio, konduto k.t. p. postuli ĉion absolutan.

Estas ekonomia mizerco. Se <sup>ĉiuj</sup> <sup>okazoj</sup> <sup>enir</sup> <sup>ĉiuj</sup> fino estas savigita. (Ĉiuj Rom-Katol. ideoj): Fidu la Eklezion! (tiam kaj nun), garantias pardonon kaj savon. La eklezio usurpis la lokon de Kristo, staras inter Dio kaj individuo. (per tio ankau la papoj pretendis havi tian potencon, pardonon pehojn kaj absolvi, ili baris la vojon al Dio) La reformantoj volas forigi la baron inter Dio kaj homo, pastreco de ĉiuj kredantoj. La Biblio mem parolas al la homoj

R.K. ideo: biblio estas provizejo de doktrinoj ne finan aŭtoritaton (strangaj interpretoj, forlaso de helkaj partoj) legu la biblion nur subinstruo de sacerdotoj.

Ref. ideo: traduki la biblion en ĉiuj lingvoj personan rilaton, relevigan potencon.



G. F. Handel Arieoj de "Messias"  
Arieo, el "Messias" Koopmans  
Mi scias, ke la Heranto vivas, kaj Li relevigas min,  
Ja min, en la lasta tag'. Se perco jam minscas, miaj  
okuloj vidas Lia. Ĉu Kristo levigis el la mort',  
1' unua el la normatoj. (Ioh 11:25, dal sein Kristoer last)

KLAVIRALA KONCERTO  
en la teatro de la Unua Komunuma Kongreso 1968/1969  
sabato, 27a de julio, 20 h. katedralo St. Georg, Limburg  
Halmaro kaj novaĵoj de la teatro en Esperanto kaj aliaj lingvoj  
Jano Jozefo: La 1700-aj Parto - Estro de  
"LIVRA ESPERANTO 1968"  
kaj verkoj de J.S. Bach, S.F. Mendel, Beethoven  
Kantato: Jelly Koopmans, Jani Niessen, Anneliese Niessen,  
Gisela Harting, Bernard Mitzel  
in la foro de St. Johannes, sed Homburg-Kirchhof  
Organizado: Brigitte Heibel, Karin Socher  
Gvidas: CAROL JORGENSEN  
Redo komponita  
por kongresanoj f  
Limburg en der Lahn

Jelly Koopmans solkantas en la Katedralo: Ariojn de Händel kaj de J.S. Bach.

Jelly Koopmans post la Koncerto antaŭ la Katedralo.

La programo de la koncerto.

1968



Academ, Vandefermarkt 10, marto 1968  
La kune Koopmansides (kaj Fico) kun  
al Szeged

En ĉi jaro estiĝis plan'  
iri kune al Limburg/Lahn!  
Ni vojaĝis ĉi je diversaj manieroj:  
biciklis Be' kaj Do laŭlonge la riveroj;  
unue al Obermarsberg panjo kun la 2 plej junaj,  
dum paĉjo vojaĝis al regionoj sunaj.  
En Szeged li prelegis en somera seminario  
kaj vizitis geamikojn en tuta Hungario.

Poemeto (pligrandigita sube) de Benata pri la jaro 1968, kun fotoj de la gefratoj Koopmans (kun amiko) kaj de patro kaj filo Wim kaj Espero Koopmans



Patro kaj filo - instruisto kaj lernanto (8<sup>a</sup> klase).

En ĉi jaro estiĝis plan'  
iri kune al Limburg/Lahn!  
Ni vojaĝis tien je diversaj manieroj:  
biciklis Be' kaj Do laŭlonge la riveroj;  
unue al Obermarsberg panjo kun la 2 plej junaj  
dum paĉjo vojaĝis al regionoj sunaj.  
En Szeged li prelegis en somera seminario  
kaj vizitis geamikojn en tuta Hungario.

Tagmeze estis en malgranda rondo  
datarigo de la diskutado pri la prelego  
de Prof. Dornaz, en kiu li diris multe  
pri kio la Roukat. gefratoj ne samopinii  
Do ĉi tiam postdiskuto estis tre fruktodona  
por forpreni autarkiajn opiniojn kiuj en la sama  
tempo ne plu tial validas.

Vespere estis la Folkloro Vespere  
dum kiuj multaj prezentiĝis. Tio.  
Gesroj Futuder kaj 4<sup>o</sup> v. Kleef videjnis  
kiuj aŭdiis bonege preparitan  
kabaradon, kiuj multaj bedare  
ne tre povis laci, pro la  
enhavo. Tamen estis bona  
La infanoj de v. Kleef  
bakiŝis. Felice  
datarigo de  
ali...

Ĝia mateno pleniĝis per du interesaj  
prelegoj, kiuj vere ne devis manki  
en ĉi tiam kongreso.  
Mme Maria Hanser prelegis pri:  
"Kristo estas mia Paco", ĉar mia paco  
estas li, kiu unuigis ambaŭ  
la intermuron de disko."  
Poste Fico C. u.  
Kristo.

Ĝis Ravidio  
Unua Komuna Kongreso  
de UELI kaj JKUE  
ek al la Sekvanka!!

Ĝis Ravidio  
Unua Komuna Kongreso  
de UELI kaj JKUE  
ek al la Sekvanka!!

# Letero de Hieronimo

el la Latina tradukis Gerrit BERVELING, NL

**K**un multe da plezuro, mia kara Deziderio, mi ricevis vian leteron, de vi, kiu same kiel Daniel per feliĉa aŭguro ricevis nomon, kiu indikis, kiu vi devis fariĝi[1]. Vi petis min, ke mi traduku en la Latinan el la Hebrea por la oreloj de niaj eklezioj la Pentateŭhon[2]. Nepre riska afero, kiu min elmetos al la bojado de miaj kritikantoj. Kvazaŭ prijuĝante intelektan laboron same kiel la vinon, ili riproĉas al mi, ke mi nur celas moki la sepdek tradukintojn[3], se mi donas ion novan anstataŭ la malnovaj formoj. Fakte oftege mi atestis, ke laŭeblece mi celas nur kontribui al la beligo de la tabernaklo de Dio, kaj ke kelkies malriĉeco neniamaniere deprenas de la riĉaj donacoj de aliaj.

Ke tion ĉi mi kuraĝis entrepreni, mi lernis de la ekzemplo de Origeno, kiu faris miksaĵon de la traduko de Teodotio kun la malnova versio[4], dum per asteriskoj kaj obeloj, t.e. per steletoj kaj streketoj li prinotis la tutan verkon, ĉu atentigante, kio anticipe mankis aŭ kion necesis forigi kiel superfluaĵon, precipe en lokoj, kiujn la evangelistoj aŭ apostoloj aŭtoritatigas, ĉar ĉe tiuj ni legas multe[5] el la Malnova Testamento, kion niaj kodeksoj ne enhavas, kiel ekzemple: “El Egiptujo Mi vokis Mian filon”, “Li nomiĝos Nazareo”, “Ili rigardos al li, kiun ili trapikis”, “Riveroj da vivanta

akvo fluos el lia ventro”, “Kion neniu okulo vidis, nek orelo aŭskultis, nek en homan koron iam ajn leviĝis – tion preparis Dio por homoj kiuj Lin amas”, kaj multe da aliaj tekstoj, kiuj meritas propran traktaĵon. Ni demandu do al la homoj, kiuj tiom atakas min, ke ili klarigu, de kie devenas ĉi citaĵoj; kaj se ili ne kapablas tion diri, ni montru al ili, ke ili venas el la Hebreaj libroj. La unua estas el Hoŝea[6], la dua el Jesaja[7], la tria el Zaharja[8], la kvara el Sentencoj[9], la kvina el Jesaja[10]. Ĉar multaj tion ne scias, ili prefere sekvas la deliraĵojn de apokrifoj kaj la kantaĉojn <diskonigitajn en> Hispanujo ol la aŭtentajn librojn. Ne estas mia tasko, klarigi tiujn teksterarojn[11]. La Judoj diras, ke tio estis farita intence, por ke Ptolemeo, kiu adoris unu solan Dion, ne kredu, ke la Hebreoj mem adoris du Diojn[12], dum ilin li taksis plej alte, ĉar <laŭ li> ili ŝajne tendencis al la instruo de Platono. Kiel ajn, ĉie kie la Sankta Skribo atestas ion sanktan pri la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito, ili aŭ alimaniere interpretas tion aŭ komplete preterpasas silente, por plaĉi al la reĝo kaj ne diskonigi la misterojn de la religio.

Mi ne scias, kiu unua inventis certan fabelon, ke en Aleksandrio oni konstruis sepdek ĉelojn, en kiuj ĉiuj <tradukistoj> memstare skribis ekzakte la sam<an tradukon>, dum la gardistestro de tiu

sama Ptolemeo, Aristeo[13], kaj multe pli poste ankaŭ Jozefo[14] tute ne raportas ion tian; sed laŭ ili kunigitaj en unu baziliko ili verkis sian tradukon, kaj ne agis profetece[15]. Estas granda diferenco inter profeto kaj tradukisto: tiu sub Dia inspiro antaŭdiras estontaĵojn, sed ĉi tiu surbaze de sia erudicio kaj lingva kapablo transdonas, kion li komprenis. Krom se prefere oni diru, ke Cicerono per Dia retora inspiro transdonis la Ekonomiko[16] de Ksenofono, la Protagoro de Platono aŭ la Por Ktesifono de Demosteno, aŭ ke la Sankta Spirito inspiris kelkajn tekstojn de la samaj libroj malsame al la sepdek tradukistoj ol al la apostoloj, tiel ke kion ili prisilentis, tion la aliaj false citis kvazaŭ tie verkitan.

Kio do? Ĉu ni kondamnas la praulojn? Tute ne; sed en la domo de l' Sinjoro ni laboras post la laboro de la antaŭaj. Ili interpretis[17] antaŭ la



Hieronimo en la studĉambro (A. Dürer, 1514)

alveno de Kristo kaj kion ili ne komprenis, ili transdonis per malklaraj frazoj, sed nun, post lia sufero kaj resurekto, ne tiom profetadon sed historion ni tradukas; ĉar kion oni vidis, oni rakontas malsame ol pri kio oni <nur> aŭdis. Ĉar pli bone ni ĝin komprenas, pli bone ni redonas ĝin.

Aŭdu do, ĵaluzulo, kritikanto, aŭskultu: la Septuaginton mi ne kondamnas, nek kritikis, sed plenkonfide mi preferas la apostolojn super ili. Ĉar per ties buŝo sonas por mi la Kristo. Ilin mi legas, ĉar en la spiritaj ĥarismoj ili staras antaŭ la profetoj, kaj la tradukistoj venas apenaŭ je la lasta vico. Kial vi torturiĝas per ĵaluzo? Kial vi incitas animojn de scienculoj kontraŭ mi? Se vi kredas, ke mi eraras en mia traduko, serĉu en la Hebreaj tekstoj, konsultu instruistojn en la diversaj urboj: kie tiuj tekstoj parolas pri la Kristo, tie tio mankas en viaj kodeksoj. <La Judoj> jam havis kiel aŭtentajn la tekstojn, kiujn la apostoloj poste uzis kontraŭ ili, kaj la Latina versio estas pli fidinda ol la Greka, kaj la Greka ol la Hebra!

Tion ĉi mi devis diri kontraŭ la enviuloj. Kaj nun, karega Deziderio, mi petas vin, ke vi kiu instigis min entrepreni tiun ĉi gigantan laboron, kaj kiu diris ke mi komencu ĉe Genezo, subtenu min per viaj preĝoj, por ke en la sama spirito en kiu ili estis verkitaj, mi povu traduki ilin Latinen.

-----  
 [1] Deziderio – nomo kiu laŭ Hieronimo jam antaŭdiris, ke li fariĝos dezirata, do amata persono. La nomo Daniel aludas al *justa verdikto*. Vidu la enhavon de la samnoma libro.



[2] La *Kvinlibro Mosea*, alivorte la *Torao*: Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj kaj Readmono.

[3] La tradukintoj de la – juda – Greka *Septuaginto*, kiun laŭ pia rakonto verkis sepdek homoj samtempe. Ĝi estiĝis en Aleksandrio Egipta; la nuna Ortodoksia Eklezio de Grekujo ankoraŭ uzas ĝian tekston en la Biblio.

[4] Teodotio (Θεοδοτιών, ĉ 200 p.Kr.) estis helenisma juda fakulo, kiu probable laboris en Efezo kaj faris propran tradukon de la Hebrea biblio en la Grekan. La celata “malnova versio” ĉi tie estas la Septuaginto.

[5] Da citaĵoj.

[6] Mateo 2:15; Hoŝea 11:1.

[7] Mateo 2:23; Jesaja 11:1. La cito ne estas klara.

[8] Johano 19:37; Zaĥarja 12:10.

[9] Johano 7:38; Sentencoj 18:4.

[10] 1 Korintanoj 2:9; Jesaja 64:4.

[11] Hieronimo do ricevis riproĉojn, ke en lia traduko troviĝas foje teksteto, kiun oni ne jam konis el antaŭa versio de la Septuaginto. Li reagis ke jen tiel ja diras la Hebrea teksto.

[12] Ŝajne Hieronimo kredis, ke origine Judismo adoris Dion laŭ diversaj “personoj” same kiel en ortodoksa kristanismo oni parolas pri Dio kiel Triunuo. Ekzemple en Genezo 1:1-2 li vidis bildon pri tiu kristana dogmo: Dio = la Patro, kiu parolas = la Parolo = La Filo, kaj la Spirito de Dio ŝvebas super la abismo = la Sankta Spirito de la Triunuo.

[13] Ekzistas Greklingva letero de Aristeo al Filokrato, kiun fakuloj datumas inter 250-100 a.Kr. aŭ eĉ en la unua jarcento p.Kr., kaj kiu rakontas pri la projekto de la tradukado de l’ Torao en la Grekan. Angla traduko en *James H. Charlesworth (ed.) – The Old Testament Pseudepigrapha*, volumo 2; New York e.a. 1985; p.12-34.

[14] Flavio Jozefo (Juda historiisto kiu verkis Greke, 37-ĉ 100 p.Kr.).

[15] Laŭ la fabelo la sepdek du tradukistoj verkis tute memstare ekzakte ĉiuvorte unu identan tradukon, kio estis pruvo ke Dio inspiris ilin.

[16] Pri mastrumado.

[17] Aŭ: tradukis.

---

## Hieronimo – Vivo de Malĥo

verkita en Betlehem en 391

### *plano por verki Eklezian Historion*

1. Kiuĵ intencas fari mar-batalon, tiuĵ preparas sin en havenoj kaj sur kvieta maro, manipulante stirilon kaj remilojn, pretigante hokojn kaj tenilojn. Ili dismetas siajn soldatojn sur la ferdeko, kaj kutimigas ilin stari ekvilibre kun piedoj deklivaj kaj sur joriga grundo;

tiel ili ne ektimas en realeco, je kio en simulita batalo ili jam alkutimiĝis. Tiel same pri mi, kiu longtempe silentis (ja igis min silenti iu, por kiu estas dolorige se mi parolas), sed nun, kiam mi planas verki pli vastan historion, unue mi deziras ekzerci min en verko malgranda, kvazaŭ dezirante forigi la ruston de mia lango.

Ĉar mi decidiĝis (se la Sinjoro bonvolas doni al mi la vivon; kaj se miaj kritikantoj fine ĉesos persekuti min, ĉar mi nun estas rifuĝinto, kiu sin enŝlosis en monaĥejon) verki Eklezian Historion depost la veno de la Savanto ĝis nia propra epoko, t.e. depost la apostoloj ĝis la fekaĵo dum kiu nuntempe ni vivas, kaj montri kiel kaj per kiuj naskiĝis la eklezio de Kristo, kiel ĝi adoltiĝis, kiel ĝi kreskis per la persekutoj kaj estis kronita de martirecoj; kaj kiel post kiam ĝi venis al kristanaj imperiestroj, ĝi ja kreskis en potenco kaj riĉeco, sed malkreskis en virtoj. Sed tio aliloke[18]. Nun unue la entreprenita afero.

### *kiel junulo Hieronimo loĝis en Sirio*

2. Maronio estas eta vilaĝo, ĉirkaŭ tridek mejlojn[19] oriente de Antioĥio en Sirio. Post multaj mastroj aŭ administrantoj, en la tempo kiam kiel junulo mi estis en Sirio, <tiu ĉi vilaĝo> fariĝis posedaĵo de papo[20]Evangrio, mia persona amiko. Mi mencias lian nomon por montri, de kie mi ekhavis la informojn, surbaze de kiuj mi skribos.

Estis tie certa oldulo, Malĥo laŭnome – Latine ni povas traduki tion kiel “Rex[21]” – Siriano laŭ nacieco kaj laŭ lingvo, vere iu lokulo. Lia kompanino estis maljunulino, kiu aspektis ege kaduka kaj proksima al la morto, ambaŭ estis tiel ĵaluze piaj kaj tiel insiste vizitadis la preĝejon, ke oni povus preni ilin por Zahario kaj Elisabeta en la evangelio, krom ke tie mankis Johano[22]. Kiam ĉe najbaroj mi scivole informiĝis, kio estas la ligo inter

ili, ĉu estas geedzeco aŭ parenceco aŭ spirita ligiteco, ili ĉiuj unusone respondis, ke ili estas sanktuloj, plaĉaj al Dio kaj respondis plej mirigajn aferojn. Dezirante ekscii pli, mi aliris al la viro mem, pridemandis lin detaleme kaj ricevis la sekvajn informojn.

### *la historio de Malĥo*

3. «Mi», li diris, «mia filo, mi laboris sur peceto da grundo en Nisibeno, sola infano de la gepatroj. Ĉar ili konsideris min heredanto kaj sola postvivanto de ilia gento, ili instigis min al geedziĝo, sed mi respondis ke prefere mi fariĝos monaĥo. Kiom minacis min la patro, kiom flatis min la patrino por delasi la ĉastecon, pruvas la nura fakto, ke mi fuĝis el la hejmo kaj de la gepatroj. Kaj ĉar orienten iri mi ne povis pro la apudeco de l’ Persa Regno kaj la lingardado de la Romiaj soldatoj, mi turnis miajn paŝojn okcidenten, kunprenante nur malmulte da provianto por ŝirmi min iomete kontraŭ la mizero. Por diri mallonge : fine mi atingis la dezerton de Ĥalkido[23], kiu situas pli malpli inter Imo kaj Beroo, sed pli sude. Tie mi trovis kelkajn monaĥojn, sub kies gvidadon mi min metis, vivtenante min per manlaborado kaj venkante la volupton de la karno per fastado.

Post multaj jaroj min kaptis la deziro reiri al la patrujo, kaj, dum ankoraŭ vivis la patrino (ĉar mi aŭdis, ke la patro jam mortis), subteni ŝin en ŝia vidvineco, kaj poste vendi la malmultan heredaĵon kaj parte donaci ĝin al malriĉuloj, parte konfidi al monaĥejo kaj (kial mi hontu

konfesi mian mankon de fido?) parte rezervi ĝin por elspezi por propra komforto.

Tiam mia abato komencis krii, ke tio estas tento de la diablo, kaj ke sub vualo de honesta afero kaŝas sin la ruzo de la praa malamiko. Estis ekzemplo – liadire – de hundo kiu reiras al sia vomitaĵo[24] ; sammaniere jam multaj monaĥoj estas trompitaj ; la diablo neniam agas malferme. . Li prezentis al mi plurajn ekzemplojn el la Biblio, i.a. ke en la komenco eĉ Adam kaj Eva estis superruzitaj de li per la espero fariĝi Dioj[25]. Kiam li ne sukcesis persvadi min, li falis antaŭ mi sur la genuojn, kaj petegis, ke mi ne forlasu lin, ke mi ne pereigu min mem, ke mi ne, tenante la plugilon, retrorigardu[26]. Ve mi malfeliĉa ! Per fia venko mi venkis mian konsilinton ; mi pensis, ke ne mian saviĝon li serĉas, sed sian komforton.

Li akompanis min el la monaĥejo, kvazaŭ por funebra procesio, kaj fine adiaŭante « Mi vidas » li diris « ke vi, mia filo, portas la brulstampon de Satano. Mi ne serĉas la kialon, nek akceptas pardonpeton. Ŝafo, kiu forkuras el la ŝafejo, estas tuj elmetita al la faŭko de l' lupoj. »

### *forkondukita kiel kaptito*

4. Se oni iras de Beroo al Odeso, apude al la ĉefvojo estas dezertaĵo, tra kiu vagadas la Saracenoj kiuj ne havas fiksitajn loĝlokon. Pro timo tiuflanka la vojaĝantoj en tiuj regionoj ofte amasiĝas por per reciproka helpo eskapi minacantan danĝeron. En mia grupo estis viroj,

virinoj, maljunuloj, junuloj, etuloj, ĉirkaŭ sepdek personoj kune. Subite jen sur dorsoj de ĉevaloj kaj kameloj atakis nin Iŝmaelidoj[27], la flirtantan hararon ligita per rubandoj, la korpojn duonnudaj, kun grandaj soldato-botoj kaj manteloj ; la saguoj pendis ŝultre, la pafarkoj ne estis streĉitaj, dum la lancojn ili vibrigis. Ili ja ne venis por batali, sed por disrabi. Oni nin kaptis, dispelis kaj kuntrenis ĉiudirekten. Intertempe tro malfrue pentante, kaj tute ne plu kapabla ekposedpreni mian heredaĵon, kune kun alia kompatinda persono, iu virino, mi estis asignita kiel sklavo al unu sama mastro. Oni nin irigis aŭ pli ĝuste portis nin supre sur kamelo-dorso tra vasta dezertaĵo, dum ĉiumomente ni timis falegi, kunligite pli ol sidante. Nia nutraĵo estis duonkruda viando, nia trinkaĵo kamelo-lakto.

Daŭrigo en sekvonta numero

-----

[18] Efektiviĝis tiu ĉi plano iom malsame: la verko nun estas konata kiel *De Viris Illustribus* aŭ *De Scriptoribus Ecclesiasticis* laŭ enkondukaj vortoj de Hieronimo mem: *Pri Famuloj* aŭ *Pri Ekleziaj Aŭtoroj*. Efektive ĝi estas nia unua *Patrologio*.

[19] Roma mejlo estis 1478 m.

[20] = episkopo.

[21] = Reĝo.

[22] *Laŭ Luko* 1:5-80.

[23] Dezerto en la limregiono inter Turkujo kaj Sirio. Ne konfuzu kun Ĥalkido en Greklando, sur Eŭbojo.

[24] 2 Petr 2:10b-22.

[25] Gen 3:1-21.

[26] Luk 9:62.

[27] Devas esti dezertaj nomadoj.

# August Weide

Ed BORSBOOM, NL

**E**n mia lasta libro “Kie miozotas memor”<sup>1</sup> el la jaro 2017 mi priskribas 31 Esperantistojn, kiuj faris por la lingvo de Zamenhof valorajn laborojn. Hazarde nun mi trovis en la ŝranko artikolon pri Esperantisto, kiun mi surpaperigis antaŭ kelkaj jaroj, sed pro iu ajn kaŭzo ne publikigis en gazeto. Tamen tiu valora samideano meritas esti ne forgesita. Jen portreto pri tiu ĉi germana Cseh-instruisto.

August Weide, 1904 Eckelshausen – 1993 Hamburgo, lernis Esperanton aŭtodidakte ĉirkaŭ 1926. Baldaŭ poste li akiris la sciojn de la Ĉe-metodo kaj dum sia tuta vivo instruis nur laŭ ĝi.

Ĝis la dua mondmilito li multe instruis en Nederlando, Norvegio kaj

Danio. En la lasta lando en Aarhus li gvidis Ĉe-kurson, dum kiu li konatiĝis kun sia estonta edzino Edith, 1912 – 1982. La edzoparo ĉefe loĝis en Danio. Post la milito reveninte al Hamburgo, li ekde 1948 instruis Esperanton en vespera altlernejo kaj en polica akademio al siaj kolegoj, uzante i.a. lernolibron, mem verkitan sub la pseŭdonimo “la policisto”.

Dufoje en 1978 kaj 1983 li vojaĝis al Koreio por instrui. Almenaŭ unu fojon li gvidis Ĉe-kurson dum UK, tio estis en 1980 en Stokholmo.

Weide verkis la studlibron “Esperanto laŭ la patrina metodo” 1979 kaj kuntradukis “Synnøve Solbakken” de B. Bjørnson 1939 kaj “ABC de amo” de I. kaj S. Hegler 1972.

La aktivulo estis nomita honora prezidanto de Hamburga Esperanto-Societo kaj en 1961 li ricevis la meritmedalon de Germana Esperanto-Asocio.

Liaj gefiloj kaj genepoj estas denaskaj Esperantistoj. Lia filino Eliza Weide aparte gravas. En 1977 ŝi iniciatis la re-eldonon de la romano “Metropoliteno” de la ruso Vladimir Varankin. Tiu ĉi forgesita ĉefverko tute ne plu estis ie ajn trovebla. La bela 2-a eldono ebligis al literaturistoj legi la unikan enhavon.

☪



La bildo montras August Weide kiam li instruas.

/Dirk 80/ Vikipedio

CC BY-SA 4.0

Ni gratulas



Joel Amis

### **Ordinado**

*Dimanĉon, la 30-an de septembro, 2018, la Feston de Sankta*

*Mikaelo kaj Ĉiuj Anĝeloj, je 4:00 pm. en la Katedralo*

*Christ Church, Ŝia Episkopa Moŝto Mary Irwin-Gibson,*

*Episkopo de Montrealo, intencas ordini **Joel Amis, B.A.,***

*M.A., M.Div., kaj **Tania Lesack, B.A., B.Th, M.Div.,** al la*

*transira diakoneco, kaj **Jhon Steeker Saint-Clair, AEC,***

*Cert. Phil., B.Th., al la karrera diakoneco.*

*Bonvolu subteni la ordinotojn per viaj preĝoj kaj, laŭeble,  
via ĉeesto.*

Ni multe gratulas al Joel Amis pro la ordinado. Ni ankaŭ bonvenigas lin kaj lian edzinon pro iliaj membriĝoj en KELI.

<http://montrealdio.ca/2018-m-div-graduate-profiles/>

<https://www.esperantic.org/en/about-us/staff-and-partners/joel-amis/>

---

## ***Prakristana beno (4a jarcento)***

La Eternulo estus antaŭ vi, por ke Li konduku Vin sur la ĝustan vojon!

La Eternulo estus apud Vi, por ke Li brakumu kaj ŝirmu Vin!

La Eternulo estus post Vi, ke Li gardu Vin kontraŭ insidoj de maliculoj!

La Eternulo estu sub Vi, ke Li kaptu vin, se Vi falos, kaj eltiru Vin el la kaptilo!

La Eternulo estu en Vi, por ke Li konsolu Vin, se malĝojo pezas sur Via koro!

La Eternulo estu ĉirkaŭ Vi, por ke Li defendu Vin, se malamiko kuras kontraŭ Vin!

La Eternulo estu super vi, por ke beno venu sur Vin!

Tiel benu Vin la bona Dio!

El aŭgusta letero de Julia Sigmond

# informejoj

## Bibliaj Tagoj en Esperanto - refoje en Mainz

2019-02-27/03-03 (merkrede ĝis dimanĉe)

**K**ompreneble ekumene! Ni atendas Kristanojn de ĉiuspecaj konfesioj el pluraj landoj. Kristanoj de ĉiuj konfesioj, sed ankaŭ ne-Kristanoj estas bonvenaj.

**T**ranoktejo estas la junulargastejo, kiu estas relative luksa. Ĉiuj ĉambroj (2-litaj, tre malmultaj 1-litaj) kun duŝo kaj necesejo, ĉiuj manĝoj, enirbiletoj, posttagmeza transportservo inkluzivaj.

**L**a ekskursojn gvidos Ulrich Matthias. Ili havas grandparte aliajn celojn ol en 2018 kaj i.a. montros la urbon Wiesbaden.

Elŝutu la aliĝilon por ekscii pli. Vi trovos ĝin kaj pli da informo je: <https://www.esperanto.de/eo/keli/aktivadoj>

Por aliĝi vi ne bezonas sendi la aliĝilon paperpoŝte. Simple sendu la informojn, kiujn demandas la aliĝilo, al la suba ret-adreso:

Rudolf Fischer:  
[fischru@uni-muenster.de](mailto:fischru@uni-muenster.de)



Katedralo de Majenco



Julia Sigmond skribas en la antaŭparolo:

*En 2012 aperis mia volumo DIALOGO. En ĝi originala esperanta poemo estas legebla en 52 tradukoj, danke al miaj helpemaj esperantistaj geamikoj el la tuta mondo.*

*En 2017 aperis la dua volumo DOLORO. Apud la originala esperantlingva poemo ĝi aperis en 54 tradukoj.*

...

*Kaj jen, en 2018 aperas la tria volumo (lasta en la serio) DANKON. Sincere mi dankas la grandaniman helpon al ĉiuj miaj esperantistaj geamikoj*

...

*La esperanta poemo estas nun legebla en 62 lingvoj aŭ dialektoj!*



## Manfred Retzlaff


4/11 1938 – 1/6 2018

**P**ro apopleksia atako Manfred Retzlaff perdis sian parolkapablon dum la lastaj jaroj. Dumvive li interesiĝis pri lingvoj ne nur kiel komunikilo inter homoj dum vojaĝoj sed ankaŭ por traduki poezion kaj kantojn, kiujn li prezentis sur la retpaĝaro [www.poezio.net](http://www.poezio.net)  
Ankaŭ en Dia Regno aperis kantoj esperantigitaj de li.

Ni kondolencas la proksimulojn.

# Dio, Vi donu akvon

M: Swing low, sweet chariot



DIO, VI DONU AKVON • M (Swing low, sweet chariot): afro-amerika spiri-  
tuala el Usono • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2019-08-10 por  
la ĵus okazanta alt-temperatura Ekumena Kongreso en Poděbrady